

# POLA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ  
LA GAZETO ESTAS FIDELA AL LA BULONJA DEKLARO


---

„Esperantysta jest każdy, kto zna język „Esperanto“ i używa go dla jakichbądź celów“.

DEKLARACJA BULOŃSKA.

„Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas“.

BULONJA DEKLARO.



„Sądzimy, że służąc naszej Ojczyźnie, Esperanto najlepiej służyć będzie sobie“.

DEKLARACJA POZNAŃSKA.

„Ni kredas, ke servante nian Patrujon, Esperanto plej bone servos sin mem“.

POZNANJA DEKLARO.

## E N H A V O:

*Redakcio:* Al niaj Legantoj. Nia Kvara Konferenco. *Stanisław Braun:* Kanto de Perfidulo, Sapiro. *Ignacy Kra-sicki:* Seged. *Petro Stojan:* Esperantaj Proverboj. *I. W. Leslie:* Ankoraŭ unu kaŭzo kial Esperanto tiel malfacile disvolvigas. *Jan Kostecki:* Pri la „Vivo de Zemenhof“. Komunikoj. Gazetoj ricevitaj.

ELDONA SOCIETO  
„Pola Esperantisto“

KOMP. KUN LIM. RESP.

Widok 19, Warszawa, Polujo.

AKCEPTAS LIBROJN, PROPAGANDILOJN  
KAJ ALIAJN ESPERANTAJOJN POR KO-  
MISIA VENDADO SKRIBU TUJ

Towarzystwo Wydawnicze  
„Pola Esperantisto“

SPÓŁKA Z OGR. ODP.

Na mocy upoważnienia Walnego Zgromadzenia Udzia-  
łowców, Zarząd Towarzystwa

**posiada do zbycia pewną liczbę udziałów,**

wartości nominalnej 50.000 Mk. każdy, po cenie Mk. 100.000  
za udział. Prócz tego w myśl uchwały Walnego Zgroma-  
dzenia z dnia 8 marca 1923 r. udziały te obowiązują do  
dopłat: a) jednorazowej w sumie złotych 8 od udziału, b)  
w ciągu pierwszych siedmiu dni każdego miesiąca od lipca  
r. 1923 do marca r. 1924 włącznie po złotych 2 od udziału.  
Za złotego liczy się wartość 1 franka szwajcarskiego w mar-  
kach polskich na giełdzie warszawskiej w przededniu  
zapłaty.

Reflektanci proszeni są o porozumienie się piśmienne  
z Zarządem Towarzystwa, Warszawa, Widok 19.

ZARZĄD

Tów. Wyd. „Pola Esperantisto“

# POLA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

---

JARO XVII WARSZAWA — MAJO, JUNIO 1923 J. № 7—8 (93—94)

---

Do Czytelników.

Al niaj legantoj.

Dnia 28 i 29 kwietnia odbyła się, stosownie do zapowiedzi, IV Konferencja Polskiego Towarzystwa Esperantystów w Poznaniu.

Ze względu na ogromne znaczenie jej uchwał postanowiliśmy, czyniąc wyjątek od przyjętej przez nas zasady, umieścić sprawozdanie z Konferencji w dwóch językach: po polsku i po esperancku, co umożliwi także i nieesperanckiej publiczności w Polsce zaznajomienie się z dążeniami i tendencjami naszego ruchu.

*Redakcja.*

La 28-an kaj 29-an de Aprilo okazis, konforme al la antaŭsciigoj la IV Konferenco de Pola Esperantista Societo en Poznań.

Konsiderante la grandegan signifon de ĝiaj rezolucioj, ni decidis, farante escepton je la akceptita de ni principo, presigi la raporton pri la Konferenco en la ambaŭ lingvoj: pola kaj esperanta, kio ankaŭ al la neesperanta publiko en Polujo permesos konatiĝi kun la spirito kaj tendencoj de nia movado.

*La Redakcio.*

## Nasza czwarta konferencja.

Konferencja Poznańska stała się faktem. Aczkolwiek zorganizowana pośpiesznie, a wskutek tego niedość licznie obesłana przez oddziały prowincjonalne, spełniła jednak w całości oczekiwania, jakie w niej pokładaliśmy.

Jej decyzje staną się na długie lata drogowskazem dla działalności Towarzystwa. Określając jasno jego charakter i dążenia, stanowią one uroczyste stwierdzenie prze-



wodnich idei esperantyzmu polskiego, dzięki którym powstał, rósł i dzięki którym liczyć może na dalszy rozwój wśród szerokich warstw społeczeństwa.

O godzinie 1 po południu w sobotę, 28 kwietnia, odbyło się w Collegium Minus Uniwersytetu wstępne zebranie, celem wzajemnego zapoznania się uczestników, poczem udano się wspólnie na plac Targów, dla zwiedzenia przygotowanej już zupełnie na jutrzejsze otwarcie Wystawy Esperanckiej. Niemal cała prasa esperancka, przedwojenna i najnowsza, wiele wartościowych dzieł, bogata kolekcja albumów i prospektów, wszystko to ujęte w estetyczne ramy eleganckiego kiosku, przyciągającego oko żywą zielenią wstęg i ozdób, z wielkim napisem na froncie: „Uczcie się języka Esperanto“. To też nic dziwnego, że nazajutrz wystawa budziła sensację, bezustannie gromadząc przed sobą grupy ciekawych i chętnych nabywców podręczników i prospektów. Jej organizatorom należy się od nas wszystkich gorąca podzięką!

Wieczór sobotni spędziliśmy mile w serdecznym kole przyjaciół esperanckich, w osobnej sali restauracji Jarockiego. Gromko rozlegał się śpiewany chórem, przy akompaniamencie fortepianu, hymn esperancki i „Świt“ Grabowskiego. Ożywiona rozmowa zatrzymała wszystkich aż do późnego wieczora.

W niedzielę zrana pracę konferencji poprzedziła msza św., celebrowana przez ks. proboszcza Cieszyńskiego, prezesa Oddziału Poznańskiego Towarzystwa, w kościele pod wezwaniem Pana Jezusa. W podniosłym kazaniu, rozpoczętym słowami psalmu: „Jaka to rzecz dobra i przyjemna, gdy bracia mieszkają razem“, ks. Prezes wymownie podkreślił zbożny i chrześcijański charakter naszej młodej idei, już dzisiaj oddającej usługi zjednoczeniu sił katolickich różnych krajów.

Zwiedziwszy następnie piękny, staroświecki ratusz poznański, uczestnicy konferencji udali się o godzinie 12 w południe na pierwsze oficjalne posiedzenie w Uniwersytecie.

Zagał je ks. Prezes Cieszyński natchnioną i poetyczną przemową, która na długo pozostanie w pamięci obecnych. Porównawszy pracę esperantystów do pracy kolejarzy kładących szyny, po których później toczyć się będą tysiące wielkich pociągów, przeprowadzając dalej piękną analogję między kulturą narodową a światową, przypomniał on słowa Karola V: „Ile ktoś posiada języków, tyle razy jest człowiekiem“ i słowa patrioty polskiego Karola Libelta: „Na ile ktoś nie zna własnego języka, na tyle upodlił w sobie człowieka“. Esperanto, zdaniem mówcy,

otwiera nam skarbnice kultur obcych, ale Esperantyści w nni pamiętać, że czas dzięki niemu zaoszczędzony należy się w pierwszym rzędzie ich własnej kulturze narodowej. Polska, wielki naród 30 milionowy, winna zająć godne jej miejsce także na polu działalności esperanckiej.

Zwracając się następnie w języku Esperanto do przybyłych z innych miast gości, mówca wita ich serdecznie, wzywając, by pamiętali zawsze o naszych dwóch wielkich celach: pierwszy — to braterstwo ludów, drugi — chwała Ojczyzny; nadzieja — to nasza wielka gwiazda świecąca, patrząc w nią pracujmy dla Ojczyzny, pracujmy dla ludzkości. Niech żyje Polska! Niech żyje braterstwo ludów!

Nagrodzony długotrwałymi, hucznymi oklaskami, mówca zaprasza następnie na Przewodniczącego Konferencji D-ra Emiljana Lotha z Pabjanic, na jego zastępcę p. Jana Kosteckiego z Warszawy, na sekretarzy p. p. Maliszewskiego z Poznania i Karolczyka z Warszawy. Wybór zgromadzeni przyjęli przez aklamację.

Obejmując przewodnictwo, Dr. Emiljan Loth udziela głosu bratu swemu, Jerzemu Lothowi, prezesowi Oddziału Warszawskiego towarzystwa. W godzinnej blisko rzeczowej przemowie, Dr. Jerzy Loth dał słuchaczom nadzwyczaj ciekawy obraz ostatnich zdobyczy naszego ruchu na polu propagandy wszechświatowej.

Wielkie zainteresowanie wywołały zwłaszcza szczegóły, dotyczące tak przychylnego dla nas raportu Sekretarza Generalnego Ligi Narodów, oraz wyników Gienewskiej Międzynarodowej Konferencji Pedagogicznej w sprawie Esperanta.

I tę przemowę przyjęto niemilknięcemi długo gorącymi oklaskami.

Po piętnastominutowej przerwie przystąpiono do obrad nad sprawami, wniesionymi na porządek dzienny konferencji.

Na pierwszym punkcie — projekty deklaracji, zgłoszone przez Zarząd Oddziału Warszawskiego. Przewodniczący udziela głosu p. Janowi Kosteckiemu, jako sprawozdawcy.

Po zwięzłym umotywowaniu, p. Kostecki proponuje Konferencji przyjęcie poniższej deklaracji:

## D e k l a r a c j a w sprawie neutralności Esperanta.

My, przedstawiciele Oddziałów Polskiego Towarzystwa Esperantystów, zgromadzeni na IV Konferencji To-

warzystwa w Poznaniu, dnia 28 i 29 Kwietnia 1923 roku, w imieniu ogółu Esperantystów-Polaków, zrzeszonych w Polskim Towarzystwie Esperantystów,

**o ś w i a d c z a m y:**

Ponieważ od pewnego czasu daje się zauważyć dążność niektórych esperantystów do łączenia idei Esperanta z postulatami natury politycznej lub społecznej;

Ponieważ dążność taka na rozwój propagandy języka Esperanto wpłynąć musi bardzo szkodliwie;

Ponieważ Esperantyści wszystkich krajów na swym pierwszym wszechświatowym kongresie w Boulogne sur Mer postanowili uroczyście, iż Esperanto być ma najzupełniej neutralnym środkiem porozumiewania się między narodami;

**E s p e r a n t y ś c i P o l s c y:**

Protestują stanowczo przeciw wiązaniu z ideją esperancką jakichkolwiek obcych jej zasad;

Zwracają się do wszechświatowych i narodowych organizacji esperanckich z gorącą prośbą, aby dla uniknięcia wielkiego niebezpieczeństwa, jakie ruchowi naszemu zagraża, zechciały postanowić:

1. Do statutów stowarzyszeń esperanckich wprowadzić następujący paragraf o wierności zasadom Deklaracji Bulońskiej:

„Zgodnie z §§ 1 i 5 Deklaracji, przyjętej na I Wszechświatowym Kongresie Esperanckim w Boulogne sur Mer dnia 7 sierpnia 1905 roku, Towarzystwo uważa, iż języka Esperanto używać ma prawo każdy i do jakichbądź celów i że język ten jest najzupełniej neutralnym środkiem porozumiewawczym między narodami, nie mającym bynajmniej na celu usuwać języków narodowych“.

2. Dla wyróżnienia stowarzyszeń, które powyższy paragraf uchwalą, dołączyć do nazwy esperanckiej towarzystwa inicjały Deklaracji Bulońskiej, np. „Pola Esperantista Societo, B. D.“

3. Na okładkach pism, wyznających zasady D. B., umieścić dewizę: „La gazeto estas fidela al la Buloŝa Deklaro“.



Po krótkiej dyskusji, w której prof. Orzech z Inowrocławia i pani Cense z Paryża proponują drobne zmiany redakcyjne (przyjęte), zebrani jednomyślnie deklarację uchwalają.

## Deklaracja w sprawie nazw krajów.

Zważywszy, że zarówno Akademia Esperancka jak i Komitet Językowy ogromną większością głosów wypowiedziały się za utrzymaniem sufiksu „uj“ dla oznaczenia nazw krajów, co podane zostało do wiadomości publicznej przez okólnik Prezesa Akademii z dnia 5 listopada 1922 r.;

Zważywszy, że po śmierci twórcy Esperanta, Doktora Ludwika Zamenhofa, instytucje te są najwyższym i jedynym autorytetem w sprawach języka Esperanto, któremu wszyscy esperantyści podlegać winni w imię jedności naszego języka, posiadającej tak ogromną wagę dla jego dalszego rozwoju i propagandy;

Zważywszy, że mimo decyzję Akademii i Komitetu Językowego niektórzy esperantyści, a zwłaszcza redakcja pisma „Esperanto“, oficjalnego organu Uniwersala Esperanto-Asocio, które w myśl uchwał XIV Kongresu w Helsingforsie weszło w skład Urzędowej Organizacji Esperanckiej, nadal używają końcówki „io“;

Zważywszy, że takie postępowanie jest dla ruchu naszego niewątpliwie szkodliwe; — *IV Konferencja Polskiego Towarzystwa Esperantystów zwraca się do wszystkich organizacji esperanckich z prośbą i sądaniem, aby zastosowały się do decyzji Akademii i Komitetu Językowego w sprawie nazw krajów.*

---

Referent proponuje, aby obie deklaracje złożyć, po skutecznieniu odpowiednich zmian formalnych, jako wniosek Towarzystwa na XV Międzynarodowy Kongres Esperancki w Norymberdze, z tym zastrzeżeniem, że w drugiej z nich wyrazy od „a zwłaszcza“ do „organizacji esperanckiej“ zostałyby usunięte, jeżeli U. E. A. uprzednio zaniecha używania końcówki „io“, lub zgodzi się na Kongresie przedstawić wniosek deklaracji wspólnie z Polskim Towarzystwem Esperantystów. Propozycję tę, podyktowaną szacunkiem dla wielkich zasług U. E. A., wraz z deklaracją w sprawie nazw krajów zebrani przyjęli jednomyślnie.

Mówiąc w dalszym ciągu, p. Kostecki przedstawia zgromadzonym projekt „Deklaracji Poznańskiej“. Wyjaśnia, iż jak to stwierdziła „Deklaracja w sprawie neutralności Esperanta“, języka Esperanto wolno używać wszystkim i do jakichbądź celów, a nikt nie ma prawa twierdzić, aby był on specjalnie związany z temi czy in-

nemi dążeniami społecznymi. Zapytuje czy my esperantysty polscy, mamy jakieś wspólne specjalne cele, do których pragnęlibyśmy używać Esperanta? Odpowiedź na to pytanie daje nam tradycja, daje cała, dwudziestoletnia blisko, działalność Towarzystwa.

Było ono zawsze wierne wielkiej idei patryjotycznej, starało się szerzyć wiadomości o Polsce zagranicą, czynem odpierając zarzut antynarodowości, stawiany esperantystom przez nieświadomych lub złej woli przeciwników. Dzisiaj, w wolnej Polsce, te tradycyjne tendencje Towarzystwa mogą już i powinny znaleźć swój oficjalny wyraz. Bohaterskie miasto Poznań jest specjalnie pomyślnym po temu terenem. Proponuje więc, aby dla upamiętnienia obecnej konferencji, deklaracji, której projekt w imieniu Zarządu Oddziału Warszawskiego składa, nadać miano „*Deklaracji Poznańskiej*“.

## Deklaracja poznańska.

My, przedstawiciele Oddziałów Polskiego Towarzystwa Esperantystów, zgromadzeni na IV Konferencji Towarzystwa w Poznaniu, dnia 29 kwietnia 1923 roku, w imieniu wszystkich Esperantystów, należących do Polskiego Towarzystwa Esperantystów;

Wobec częstych nieporozumień, uznając konieczność wyjaśnienia stanowiska polskiego narodowego ruchu esperanckiego względem języka ojczystego i zagadnień ogólnonarodowych, a także w celu uwydatnienia różnicy, istniejącej między zapatrywaniami naszego Towarzystwa, a poglądami pewnych sfer esperanckich, czy to miejscowych, czy obcokrajowych;—

*Stwierdzamy*, że język pomocniczy Esperanto, zgodnie z uroczystą deklaracją Pierwszego Wszechświatowego Kongresu Esperanckiego w Boulogne sur Mer, jest najzupełniej neutralnym środkiem porozumiewawczym, którego, w myśl tejże deklaracji, używać wolno każdemu i do jakichbądź celów;

*Stwierdzamy*, że język Esperanto bynajmniej nie ma na celu usunąć w przyszłości języków narodowych, lecz wprost przeciwnie, uwalniając od konieczności studjowania wielu języków obcych, umożliwić przez to samo gruntowniejsze poznanie mowy ojczystej.

W trosce o nieuszczerplenie, nawet w najmniejszym stopniu, zakresu używalności tej mowy, **stanowimy, iż**



**Polskie Towarzystwo Esperantystów w stosunkach zewnętrznych z osobami i instytucjami na terenie Rzeczypospolitej Polskiej używać będzie wyłącznie języka polskiego.**

*Stwierdzamy*, że jak to wykazała dotychczasowa działalność Towarzystwa od pierwszej chwili jego istnienia, Esperanto już dzisiaj sprawie narodowej okazywać może znaczne usługi, roznosząc po całym świecie wiadomości o Polsce, o jej historii i kulturze, ideałach i dążeniach, a także pośrednicząc w nawiązaniu z zagranicą stosunków handlowych.

Świadomi obowiązków, jakie nakłada na nas ustawiczne stykanie się z przedstawicielami wielu narodów, *oświadczamy*, że Polskie Towarzystwo Esperantystów i jego poszczególni członkowie i nadal, przy każdej nadarzącej się sposobności, służyć będą interesom Ojczyzny, czy to informując o niej zagranicę, czy starając się zacieśnić węzły przyjaźni, łączące ją ze sprzymierzeńcami z zachodu, czy wreszcie zbijając oszczerstwa jej wrogów.

Sądzimy, że służąc naszej Ojczyźnie, Esperanto najlepiej służyć będzie sobie.

Aby zaś, te nasze zasady w działalności Towarzystwa nazawsze były utrwalone, **postanawiamy żądać od nowoprzyjmowanych Członków i Oddziałów przystąpienia do niniejszej deklaracji.**



Tekst deklaracji przyjęto jednomyślnie, w nastroju uroczystego wzruszenia. W dyskusji podkreślano słusznie, iż zwłaszcza w chwili obecnej, gdy Esperanto tak często używane jest do celów agitacji kosmopolitycznej, jest rzeczą niezmiernie ważną, dla dobra samego ruchu esperanckiego, aby przeciwstawić się wyraźnie tego rodzaju dążeniom.

Po przyjęciu deklaracji przez głosowanie, Przewodniczący odłożył dalszy ciąg posiedzenia do godziny 7 wieczorem.

W międzyczasie znaczna grupa uczestników, spożywszy wspólnie obiad, udała się ponownie na tętniący życiem Targ, aby raz jeszcze nacieszyć oczy widokiem naszej Wystawy. Powodzenie bardzo duże! Nasi dzielni poznańscy koledzy, a zwłaszcza sympatyczna panna Jakóbiakówna, oraz p. p. Kapela i Maliszewski musieli napracować się porządnie, aby zadowolnić wszystkich interesantów i ciekawych.

Drugie posiedzenie konferencji rozpoczęło się z pewnym opóźnieniem, o godz. 7.30, w lokalu restauracji Jarockiego. Po ożywionej dyskusji przyjęto projekt uzupełnień do statutu, w duchu Deklaracji Poznańskiej, a w myśl wniosku p. Wacława Woydego z Warszawy, dla przedstawienia Oddziałom Towarzystwa.

Uchwalono dalej zalecić jak najgoręcej wszystkim esperantystom polskim poparcie Towarzystwa Wydawniczego „Pola Esperantisto“, od którego rozwoju zależy w znacznej mierze powodzenie propagandy esperanckiej w naszym kraju. Obecnie fundusze tego towarzystwa pochłania całkowicie wydawanie pisma. Zapisanie się nowych udziałowców, zwiększając kapitał, umożliwiłoby druk podręczników, broszur propagacyjnych, prospektów, których brak tak silnie uczuwać się daje, a handel którymi z pewnością opłaciłby się także i materialnie. Niechże więc każdy, kto może, weźmie ten apel konferencji do serca!

Na wniosek p. Tadeusza Kapeli z Poznania powzięto nader ważną uchwałę, *aby odtąd funkcje Zarządu Centralnego Towarzystwa pełnił Zarząd oddziału warszawskiego.*

Istotnie, system dotychczasowy, przy którym członkowie Zarządu mieli swe siedziby w różnych miastach, wpływał bardzo ujemnie na żywotność instytucji.

Tenże wnioskodawca zaproponował, aby Konferencja uchwaliła zalecić Zarządowi Centralnemu poczynienie starań o zmianę nazwy *esperanckiej* Towarzystwa na „Pola Esperanto Asocio“, pozostawiając jego dotychczasową nazwę polską bez zmiany.

Wysłuchawszy uzasadnienia, iż wyraz „asocio“ lepiej oddaje pojęcie zrzeszenia, mającego swe oddziały w wielu miejscowościach, niż „societo“ — zebrani wniosek przyjęli.

W zastępstwie nieobecnego Przewodniczącego zamykając Konferencję, p. Kostecki wyraził, w imieniu wszystkich gości z innych miast, gorące podziękowanie esperantystom poznańskim, a zwłaszcza szanownemu ks. Prezesowi Cieszyńskiemu i p. p. Maliszewskiemu i Kapeli, za wzorową organizację Konferencji i Wystawy i serdecznie przyjęcie. Oddział Poznański złożył nowy piękny dowód swej żywotności i ma pełne prawo z wiarą patrzeć w przyszłość. Niech żyją esperantyści poznańscy! Niech żyje Esperanto!

Na zakończenie odśpiewano chórem hymn esperancki, którego zebrani wysłuchali w podniosłym nastroju.

Konferencja Poznańska, zarówno ze względu na wielkie znaczenie jej uchwał, jak i na tę serdeczną atmosferę,

jaka na niej panowala, zapisze się niewątpliwie trwałemi zgłoskami w annałach Towarzystwa. Jest ona zarazem ostatnią zamkniętą konferencją delegatów. Szybki rozwój Towarzystwa umożliwia już zwołanie na wiosnę roku przyszłego wielkiego ogólnego Kongresu do Warszawy.

## Nia kvara konferenco.

La Poznanja Konferenco fariĝis fakto. Kvankam aranĝata rapideme kaj tial nesufiĉe multnombre partoprenita de la provincaj grupoj, ĝi tamen plenumis entute niajn esperojn.

Ĝiaj decidoj dum longaj jaroj restos vojmontrilo por la agado de la Societo. Difinante klare ties karakteron kaj tendencojn, ili aperas kiel solena konstato de la principaj ideoj de pola esperantismo, dank' al kiuj ĝi naskiĝis, kreskis — kaj dank' al kiuj ĝi povas fidi je plua progreso en vastaj sferoj de la socio.

Sabate, la 28-an de aprilo, je 1 h. posttagmeze okazis, en *Collegium Minus* de la Universitato, interkonatiga kunveno, post kiu la partoprenantoj ekiris kune la Foirplacon por viziti tute jam preparitan por la morgaŭa malfermo Esperantan Ekspozicion. Preskaŭ kompleta esperanta gazetaro, la antaŭmilita kaj la plej nova, multaj valoraj libroj, riĉa kolekto de albumoj kaj propagandfolioj, ĉio ĉi kunligita en la estetikaj kadroj de eleganta kiosko, altiranta la okulon per viva verdo de rubandoj, kaj ornamaĵoj kun granda surskribo en la fronto: „Lernu la lingvon Esperanto“. Nenio miriga, ke la sekvantan tagon la ekspozicio vekadis sensacion, arigante antaŭ si grupojn de scivolaj kaj volontaj aĉetantoj de lernolibroj kaj propagandiloj. Al ĝiaj organizintoj ni ŝuldas ĉiuj plej varman dankon!

La sabatan vesperon ni pasigis agrable en simpatia rondo de amikoj esperantaj, en aparta ĉambrego de restoracio Jarocki. Laŭte sonis ĥore kantata, ĉe pianakompano, la Himno esperanta kaj la „Tagigo“ de Grabowski. Vigla interparolado haltigis ĉiujn ĝis malfrua horo.

Dimanĉe matene, antaŭ la laboroj de la konferenco okazis meso, celebrita de pastro preposto Cieszyński, prezidanto de la Grupo Poznań de P. E. S., en la preĝejo de Sinjoro Jezuo. En altfluga prediko, komencita per la vortoj de psalmo: „Kiel estas bone kaj agrable, kiam fra-

toj arigas kune“, Pastro Prezidanto elokvente substrekis etikan kaj kristanecan karakteron de nia juna ideo, jam hodiaŭ servanta la kunigon de diverslandaj fortoj katolikaj.

Vizitinte poste la belan malnovtempan urbodomon poznanjan, la konferencanoj kunigis je 12 h. tagmeze por la unua oficiala kunsido en la Universitato.

Malfermis ĝin pastro Prezidanto Cieszyński per inspirplena kaj poezia alparolo, kiu restos longe en la memoro de la ĉeestintoj. Komparinte la laboron de esperantistoj al tiu de la fervojistoj, kiuj metas relojn, sur kiuj estonte kurados miloj da grandegaj vagonaroj, en bela analogio inter kulturo nacia kaj la universala li memorigis la vortojn de Karlo V: „Kiom iu parolas da lingvoj, tiomoble li estas homo“ — kaj la vortojn de pola patrioto Karol Libelt: „Kiom iu ne konas propran lingvon, tiom li malvirtigis en si la homon“. Esperanto, laŭ la parolanto, malfermas al ni la trezorejojn de fremdaj kulturoj. Esperantistoj tamen ne forgesu, ke la tempo sparita dank' al ĝi apartenu unuavice al ilia propra kulturo nacia. Polujo, granda 30 miliona nacio, devus okupi konvenan por si lokon ankaŭ sur la kampo de esperanta agado.

Turnante sin poste en la lingvo Esperanto al la gastoj, alvenintaj de aliaj urboj, la parolanto salutas ilin kore, petante, ke ili memoru ĉiam pri niaj du altaj celoj: la unua estas frateco de popoloj, la dua — gloro de Patrujo; la espero — nia granda stelo brilanta; ĝin rigardante, ni laboru por la Patrujo, ni laboru por homaro, Vivu Polujo! Vivu la frateco de popoloj!

Dankita per longdaŭraj, tondraj aplaŭdoj, la parolanto invitas kiel Prezidanton de la Konferenco D-ron Emiljan Loth el Pabjanice, kiel lian anstataŭanton S-on Jan Kostecki el Warszawa, kiel sekretariojn: S-ojn Maliszewski el Poznań kaj Karolczyk el Warszawa. La elekton la ĉeestantoj aprobis per aklamado.

Akceptante la prezidantecon, D-ro Emiljan Loth donas la voĉon al sia frato, D-ro Jerzy Loth, prezidanto de la Grupo Warszawa de P. E. S. En preskaŭ unuhora enhavoriĉa parolo, D-ro Jerzy Loth prezentis al la aŭskultantoj eksterordinare interesan bildon de la lastaj sukcesoj de nia internacia propagando. Grandan ekinteresiĝon vekis precipe la fragmentoj, koncernantaj la tiom favoran por ni raporton de la Ĝenerala Sekretario de Ligo de Nacioj kaj la rezultojn de la Ĝeneva Konferenco de Instruistoj pri Esperanto.

Ankaŭ tiu ĉi parolo estis salutita per longe nesilentigantaj, varmaj aplaŭdoj.



Post dekkvinminuta interrompo, komencigis la diskutoj pri la aferoj, enskribitaj en la tagordon de la konferenco.

Sur la unua punkto - projektoj de deklaroj, prezentitaj de la Estraro de Grupo Warszawa. La Prezidanto donas la voĉon al S-o Jan Kostecki kiel raportanto.

Konkize motiviginte, S-o Kostecki proponas al la Konferenco la akcepton de suba deklaro:

## Deklaro pri neŭtraleco de Esperanto.

Ni, reprezentantoj de Grupoj de Pola Esperantista Societo, kunvenintaj al la IV Konferenco de la Societo en Poznań, la 28 kaj 29 de Aprilo 1923, en la nomo de ĉiuj polaj esperantistoj, organizitaj en la Pola Esperantista Societo,

### **d e k l a r a s :**

Ĉar, de certa tempo, rimarkebla estas la tendenco de kelkaj grupoj de Esperantistoj ligi la principon de Esperanto kun postuloj politikaj aŭ sociaj;

Ĉar tia tendenco sur la progreson de la propagando de la lingvo Esperanto devas influi tre malbone;

Ĉar ĉiulandaj Esperantistoj dum sia unua tutmonda kongreso en Boulogne-sur-Mer solene decidis, ke Esperanto devas esti absolute neŭtrala komprenilo inter la popoloj;

### **P o l a j E s p e r a n t i s t o j :**

Protestas firme kontraŭ kunigado kun la esperanta ideo de iaj ajn fremdaj al ĝi principoj;

Turnas sin al tutmondaj kaj naciaj organizoj esperantaj kun varma peto, ke por eviti la grandan dangeron, kiu minacas al nia movado, ili bonvolu decidi:

1. En la regularojn de esperantaj societoj enkonduki sekvantan paragrafon pri la fideleco al la principoj de Buloŝa Deklaro:

„Konforme al la §§ 1 kaj 5 de la Deklaro, akceptita de la I Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer, la 7-an de Aŭgusto 1905, la Societo opinias, ke la lingvon Esperanto rajtas uzi ĉiu, kaj por iaj ajn celoj, kaj ke tiu lingvo estas absolute neŭtrala komprenilo inter la popoloj, neniom celanta elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn“.

2. Por diferencigo de la societoj, kiuj la supran paragrafon akceptos, aldoni al esperanta nomo de la Societo la inicialojn de la Bulonja Deklaro, ekz: „Pola Esperantista Societo, B. D.“

3. Sur kovriiloj de gazetoj, konfesantaj la principojn de B. D., presigi devizon: „La gazeto estas fidela al la Bulonja Deklaro“.

\* \* \*

Post mallonga diskutado, en kiuj prof. Orzech el Inowrocław kaj S-ino Cense el Paris proponas malgrandajn redaktajn ŝanĝojn (akceptitajn), la kunvenintoj aprobas la deklaron unuanime.

## Deklaro pri landnoma demando.

Konsiderinte, ke la Akademio de Esperanto kaj la Lingva Komitato per grandega plimulto da voĉoj decidis konservi la sufikson „uj“ por difino de landnomoj, kio estis publike komunikita per la cirkulero de la Prezidanto de Akademio la 5-an de Novembro 1922;

Konsiderinte, ke post la morto de la Kreinto de Esperanto, Doktoro Ludwik Zamenhof, la ambaŭ suprecititaj institucioj estas plej alta kaj unika aŭtoritato en la aferoj de la lingvo Esperanto, al kiu ĉiuj Esperantistoj devas submetigi en la nomo de unueco de nia lingvo, havanta tiel grandegan signifon, por ĝia plua disvolvo kaj propagando;

Konsiderinte, ke malgraŭ la decido de la Akademio kaj de Lingva Komitato kelkaj esperantistoj, kaj precipe la redakcio de gazeto „Esperanto“, oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, kiu konforme al la decidoj de la XIV Kongreso en Helsinko farigis, parto de Oficiala Esperanta Organizo, plue uzas la finaĵon „io“;

Konsiderinte, ke tia sinteno estas por nia movado sendube malutila; — *la IV Konferenco de Pola Esperantista Societo turniĝas al ĉiuj esperantaj organizoj kun peto kaj postulo, ke ili konformiĝu al la decido de la Akademio kaj Lingva Komitato pri landnomoj.*

\* \* \*

La raportanto petas, ke la ambaŭ deklaroj, post efektivigo de konvenaj ŝanĝoj formalaj, estu ankaŭ sendataj kiel proponoj de la Societo al la XV Universala Kongreso de Esperanto en Nürnberg, kun tiu kondiĉo, ke en la dua, la vortoj de „kaj precipe“ ĝis „Esperanta Organizo“ estu forigataj, se U. E. A. ĉesus pli frue uzi la finaĵon „io“ aŭ konsentus prezenti al la Kongreso la proponon pri la deklaro kune kun Pola Esperantista Societo. Tiu ĉi propono, inspirita per la estimo por grandaj meritoj de U. E. A., kaj la deklaro estas unuanime akceptitaj de la kunvenintoj.

Parolante plue, S-o Kosteki prezentas al la konferencanoj la projekton de „Poznanja Deklaro“. Li klarigas ke, kiel konstatis la „Deklaro pri neŭtraleco de Esperanto“, la lingvon Esperanto povas uzi ĉiuj, por iaj ajn celoj, kaj neniu havas la rajton aserti, ke ĝi estas speciale ligita kun tiuj aŭ aliaj sociaj tendencoj. Li demandas, ĉu ni, polaj Esperantistoj, havas iajn komunajn specialajn celojn, por kiuj ni dezirus uzi Esperanton? La respondo al tiu ĉi demando donas al ni la tradicio, donas la tuta preskaŭ dudekjara agado de la Societo. Ĝi estis ĉiam fidela al la granda patriota ideo, penis disvastigadi informojn pri Polujo eksterlande, per ago forpuŝante la kulpigon pri kontraŭnacieco, faratan al Esperantistoj de nesciemaj aŭ malbonvolaj kontraŭuloj. Hodiaŭ, en libera Polujo, tiuj tradiciaj tendencoj de la Societo povas jam, kaj devas trovi sian oficialan esprimon. La heroa urbo Poznań estas por tio speciale konvena tereno. Li proponas do, ke por la memorigo de la nuna konferenco, al la deklaro, kies projekton li prezentas en la nomo de la Estraro de Grupo Warszawa, oni donu la titolon: „*Poznanja Deklaro*“.

## Poznanja Deklaro.

Ni, reprezentantoj de Grupoj de Pola Esperantista Societo, kunvenintaj al la IV Konferenco de la Societo, en urbo Poznań, la 29-an de aprilo 1923, en la nomo de ĉiuj Esperantistoj, apartenantaj al Pola Esperantista Societo,

Kaŭze de oftaj malkomprenoj, sentante la neceson klarigi la rilaton de pola nacia movado esperantista al la lingvo gepatra kaj problemoj generale-naciaj, ankaŭ en la celo substreki la diferencon, ekzistantan inter la opinioj de nia Societo kaj la vidpunkto de certaj sferoj esperantistaj, ĉu lokaj, ĉu alilandaj;

*Konstatas*, ke la helplingvo Esperanto, konforme al la solena deklaro de Unua Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer, estas absolute neŭtrala komprenilo, kiun, laŭ la deklaro, povas uzi ĉiuj kaj por ia ajn celo;

*Konstatas*, ke la lingvo Esperanto neniom celas forigi estonte la lingvojn naciajn, sed tute male, liberigonte de la neceso studi multajn fremdajn lingvojn, ebligi per tio mem la pli profundan ekkonon de lingvo gepatra.

Klopodante ne malvastigi eĉ en plej malgranda grado, la sferon de uzebleco de tiu-ĉi lingvo, **ni decidis, ke Pola Esperantista Societo, en eksteraj rilatoj kun personoj kaj institucioj sur la teritorio de la Pola Respubliko, uzados ekskluzive la lingvon polan.**

*Ni konstatas* ke, kiel pruvis la ĝisnuna agado de la Societo de unua momento de ĝia ekzisto, Esperanto jam hodiaŭ povas la patriotan ideon servi valore, disportante tra la tuta mondo la ekkonon de Polujo, de ĝia historio kaj kulturo, idealoj kaj celadoj, kaj ankaŭ perante en ligado de komercaj rilatoj kun la eksterlando.

Konsciaj pri la devoj, kiujn surmetas al ni la konstanta kuntuŝo kun reprezentantoj de multaj nacioj, *ni deklaras*, ke Pola Esperantista Societo kaj ĝiaj membroj aparte, ĉe ĉiu prezentigonta okazo, servos la aferojn de la Patrujo, ĉu informonte pri ĝi la eksterlandon, ĉu penonte kunpremi la ligilojn de amikeco, kunigantajn ĝin kun ĝiaj aliancanoj de la Okcidento, ĉu fine kontraŭbatalonte la kalumniojn de ĝiaj malamikoj.

Ni kredas, ke servante nian Patrujon, Esperanto plej bone servos sin mem!

Kaj, ke tiuj-ĉi niaj principoj en la agado de la Societo por ĉiam estu fiksitaj, **ni decidis postuli de novakceptotaj Membroj kaj Grupoj la aliĝon al ĉi-tiu nia deklaro.**

\*

\*

\*

La tekston de la deklaro oni akceptas unuanime, kun solena emocio. En la diskuto estis ĝuste substrekata, ke precipe en la nuna momento, kiam oni tiel ofte uzas Esperanton por la celoj de kosmopolita agitado, estas afero ekstreme grava, pro la bono de esperanta movado mem, kontraŭstari al tiaspecaj tendencoj.

Post la akcepto de la deklaro per voĉdonado, la Prezidanto prokrastis la daŭrigon de la kunsido ĝis 7 h. vespere.



Intertempe multnombra grupo de la partoprenantoj, post komuna tagmanĝo, revizitis la vivobruan Foiron, por ankoraŭ foje ĝojigi la okulojn per la vidaĵo de nia Ekspozicio. Tre granda sukceso! Niaj bravaj poznanjaj samideanoj, kaj precipe la simpatia F-ino Jakóbiak kun S-oj Kapela kaj Maliszewski devis labori firme, por kontentigi ĉiujn klientojn kaj scivolulojn!

La dua kunsido de la konferenco komenciĝis kun ioma malfruigo je 7 h. 30, en la salono de restoracio Jarocki. Post vigla diskuto oni akceptis la projekton pri aldono al la regularo, laŭ la esenco de Poznanja Deklaro, kaj konforme al la propono de S-o Wacław Woyde el Warszawa, por prezento al la Grupoj de la Societo.

Oni decidis rekomendi plej varme al ĉiuj polaj esperantistoj la subtenon de la Eldona Societo „Pola Esperantisto“, de kies disvolvo dependas grandparte la sukceso de esperanta propagando en nia lando. Nuntempe, la monrimedojn de tiu societo konsumas senreste la eldonado de la gazeto. Aligo de novaj partoprenantoj, pligrandigonte la kapitalon, permesus presadi lernolibrojn, propagandajn broŝurojn, flugfoliojn, kies mankosentigas tiel forte, kaj komerco, kiuj donus certe ankaŭ materialan profiton. Prenu do ĉiu, kiu povas, tiun ĉi alvokon de la konferenco, al la koro!

Laŭ propono de S-o Tadeusz Kapela el Poznań oni faris tre gravan decidon, *ke la funkciojn de Centra Estraro de la Societo plenumu de nun la Estraro de Grupo Warszawa*. Efektive, la antaŭa sistemo, ĉe kiu membroj de la Estraro havis siajn sidejojn en diversaj urboj, influis tre malbone je la vivanteco de la institucio.

La sama proponanto petis, ke la Konferenco decidu rekomendi al la Centra Estraro, ke ĝi klopodu pri la ŝanĝo de *esperanta* nomo de la Societo je „Pola Esperanto Asocio“, lasante ĝian ĝisnunan nomon polan senŝanĝe. Auskultinte la klarigon, ke la vorto „asocio“ pli bone prezentas la ideon de organizo kuniganta grupojn en multaj lokoj, ol la vorto „societo“, — la kunsidantoj akceptis la proponon.

Foreste de la Prezidanto, fermante la Konferencon, la anstataŭanto, S-o Kostecki, esprimis en la nomo de ĉiuj gastoj el aliaj urboj, ilian varman dankon al la poznanjaj Esperantistoj, kaj precipe al estimata Pastro Prezidanto Cieszyński S-oj Maliszewski kaj Kapela, pro modela organizo de la Konferenco kaj Ekspozicio, kaj ilia kora akcepto. La Grupo Poznań donis novan belan pruvon de sia vigla energio, ĝi havas plenan rajton kun fido rigardi al la estonto. Vivu poznanjaj Esperantistoj! Vivu Esperanto.

Oni finis per solena, agorda horkanto de la Himno.

La Poznanja Konferenco, same pro la grandega graveco de ĝiaj decidoj, kiel pro tiu kora atmosfero, kiu regis dum ĝi, enskribigos certe per fortaj literoj en la historion de la Societo. Ĝi estis samtempe lasta konferenco en fermita rondo de delegitoj. La rapida progreso de la Societo ebligas jam kunvenigi, dum la printempo de venonta jaro, grandan ĝeneralan Kongreson en Warszawa.

STANISLAW BRAUN.

## Kanto de Perfidulo.

Kie vi estas, mia espero,  
Fervoro mia por la afero,  
Nenio vivon vian atestas  
— Kie vi estas?

Kie vi estas antaŭa flamo,  
Fido antaŭa, ardanta amo,  
Ŝajne nenia postsigno restas  
— Kie vi estas?

Ĉu Vin, ho freŝa, bela Espero,  
Jam adiaŭis hela somero,  
Ke nun vi kvazaŭ en tag' aŭtuna  
Arbeto juna?

Ĉu vin, ho sindonema fervoro,  
Pen' malvarmigis de la laboro,  
Ke vi vin kasis kun ia timo  
En la animo?

Ĉu vin, ho juna, brulanta flamo,  
De l' mond' estingis homa malamo,  
Ke vi nun igis el suno ĉarma  
Cindro malvarma?

Ĉu vin, ho granda infaua fido,  
 Rompis nespertaflug' de aglido,  
 Ke nun en koron sur kupra nuboj  
 Enstelis duboj?

Ĉu vin, ho sankta homara amo  
 De l' propra hejmo sufokis dramoj,  
 Ke nun ĉi—monda sent' de l' animo  
 Sajnas la krimoj?

Ho Esperanto! Se Providenco  
 Al vi destinis esti potenco  
 Kiu forigos sangan minacon  
 Kaj faros pacon,

Se vi sur tiu malgaja tero  
 Estas de bona estont' fajrero,  
 Kiu post longa kun krim' baraktoj  
 Farigos faktoj, —

Mi por honoro via kaj gloro  
 Tiam elspinos kanton el koro,  
 Kian ne aŭdis de la jarmilo  
 Iu terfilo...

Sed eĉ se via hela espero  
 Neniam igos faktoj sur teroj  
 Kaj se de via afer' en mondo  
 Degelos rondo,

— Se laborantoj sindonaj viaj  
 Unuj mortados post la aliaj,  
 Ĝis restos lasta sur la remparo  
 Malgranda aro —

Eĉ tiam penos mi el animo  
 Fieran morton laŭdi per rimo,  
 Korojn karesi dum agonio  
 Per melodio...

Kaj ĝis sur teraj ebenoj vastaj  
 Brave sin tenos soldatoj lastaj,  
 Mi restos firma apud standardo  
 Fidela bardo.

# S O P I R O .

Hejmon forlasis mia animo,  
 Postsignon helan en mond' serĉante;  
 Post marojn, montojn, en spac' sen limo,  
 Ĝi iris plende kaj sopirante,

Kiel folio de l' arb' falinta  
 Dum griza tago de la aŭtuno,  
 Kiel folio duonvelkinta  
 Kun vent' sin trenis al hel' al suno —

Kiel radio en kelo nigra  
 Sur muro ŝima sole mortanta,  
 Kiel radio sopire — nigra,  
 Ĉiun angulon tralumiganta.

Kiel sopiro — eterne forta,  
 Kiel la amo — ĉiam revanta,  
 Kiel la sonĝo — ĉiam senvorta,  
 Ĉiam aspira kaj esperanta!

Kaj nun mi estas kiel folio  
 De l' arbo, patra en mond' jetita,  
 Kiel mortanta en kel' radio,  
 De ĉiuj sola kaj forlasita.

Kaj nun mi estas kiel pilgrimo,  
 Kiu dum vojo falas mortante...  
 Hejmon forlasis mia animo  
 Postsignon helan en mond' serĉante.

IGNACY KRASICKI.

# S E G E D

FABELO ARABA.

Suverena monarĥo de multaj nacioj, estro de Nilaj fontoj, Seged, post la deksepa jaro de sia regado, diris al si mem:

— „Finitaj estas ciaj laboroj, ho Seged, ci al militis la malamikojn, subjugis apudajn naciojn, kvietigis la ribe-



lantojn, riĉigis ciajn regatojn, ĉirkaŭis landlimojn per fortikaĵoj, ornamis la urbojn per majestaj konstruaĵoj; tremas najbaroj je sono de cia nomo, amas cin la subuloj. Nun, ci povas ĝui feliĉon kaj post tiom da penadoj, dolĉe ekriprozi“.

Kaj li decidis destini dek tagojn jare, nur por tio, ke forĵetinte aliajn aferojn, li sindonu al plej agrablaj amuzadoj. Tiucele, li komandis serĉi en tuta ŝtato, plej ĉarman lokon, kie li povus pasigi tiamaniere, jenajn dek tagojn.

Oni do trovis sur lago Dumbia, insulon, kiu enhavis ĉion, kion plej bele povis krei la naturo. Seged, pri tio sciigita, kunvokis arkitekturistojn kaj ordonis al ili tien veturi kaj konstrui plej pompan palacon kaj planti plej belajn ĝardenarbojn kaj florojn; mallongdire, arangi ĉion plej belforme kaj kun plej alta artismo. Ĉar li volis havi plej grandan kontentigon, li decidis nur tiam viziti la ĝuidan insulon, kiam ĉiuj konstruaĵoj kaj cirkaŭaj arangaĵoj estos finitaj, por sperti, ĉe sia alveturo, tiom pli grandan plezuron kaj surprizon.

Kiam ĉio estis jam preta, oni sciigis pri tio, Segedon. Por kompletigi siajn agrablajn impresojn, li elektis por kunularo en tiu ekskurso, plej ĝentilajn, spritajn kaj belajn personojn de ambaŭ seksoj. Veturante, li figuris al si, ĉion, en flama imago, tiel allogante, ke tien alveninte, li multe seniluziigis; la pompeco de l'konstruaĵoj ne estis tia, kian li deziris, la ĝardenoj ne tiel formitaj, kiel li esperis. Li ordonis kunvoki la arangintojn kaj admonis ilin severe, pro neplenumo de lia volo. Kaj ĉar ĉi-tio enkondukis lin en malbonan humoron, li neniun, ĝis vespero, al si allasis — kaj tiel finiĝis unua tago.

Sekvintan matenon, li vekigis kun kapdoloro, ĉar dum preskaŭ tuta nokto, li nur pensis, per kio komenci la amuzadserion; kaj, ĉar ĉio, kion ajn li povis elekti, estis preta por realigi, li bedaŭris forlasi unu, por efektiviĝi ion alian. Restante do, ĝis tagmezo en maltraŭkvila necerteco, li kunvokis konsilantaron. La opinioj estis deversaj kaj la konsiligado daŭris tiel longe, ke kiam li intencis eliri el palaco, li ekrimarkis, ke la suno estis jam ĉe subiro; li revenis do kolere en sian ĉambron — kaj tiel finiĝis dua tago.

Kiam li levigis trian tagon, li ekvidis, ke pluvas, kvankam li ĝuste projektadis iluminacion; li do malbenis sunon, tagon kaj nubojn. Sed ĉar la nuboj, malgraŭ lia multpova kolero, ne disigis, la suno ne eklumis kaj pluvo farigis pli kaj pli densa, li ordonis anonci al tuta so-

cieto, ke li jam ne aperos en la salonoj — kaj tiel finigis tria tago.

Kvaran matenon, Seged vekiginte, ekrimarkis, ke la vetero estas bela kaj serena; li do ordonis, ke la gastoj kunigu en la belaj ĉambregoj. Tien alveninte, li salutis ilin kun gaja vizago kaj diris:

— „Geamikoj, hodiaŭ ni estu gojigantaj ĝis satiĝo; ni distriĝu, ridu, ŝercu! Tiu tago estu plej agrabla en nia vivo“!

Ciuj promesis tutkore gojiĝi, sed, spite tiun intencon, ju pli Seged rekomendis gajecon, des pli ia enuo ekposedis la gesocietanojn. Unu aŭ alia deklaris diri ion ridindan, sed kiam ĝi estis dirita, neniu ridis. La sinjorinoj, per ventumiloj aŭ postuketoj kovradis sian oscedadon. Tio ĉagrenigis tiel Seged, ke li kuŝiĝis preskaŭ kun ploro—kaj tiel finigis kvara tago.

Por la kvina, estis difinita barka promenado sur lago kaj post ĝi, grandioze artifikaj fajraĵoj. Ciuj do, post tagmango, sidigis en elegantajn boatojn. Sed kelkaj sinjorinoj, ne alkutimigitaj al naĝado, eksentis naŭzon; al iu alia ŝajnis, ke ŝi vidas krokodilon kaj komencis sveni. Estis do necese albordiĝi antaŭ la tempo difinita. Kaj ĉar Seged ordonis, ke oni ekbruligu la fajraĵojn ĉe lia alveturo kaj ne povis ĝustatempe ordoni prokraston, do, protio, ke la suno ankoraŭ lumis, ili aspektis tre mizere. Li do tuj foriris, forte malkontenta, al sia ĉambro — kaj tiel finigis kvina tago.

Ĉirkaŭ la mezo de sesa tago, Seged, kiu por tiu dektaga projektata ĝuado, oferis grandegan monsumon, nenion ŝparante, ekkonsideris nun kun miro, ke malgraŭ tiom da penadoj, elspezoj kaj fortostreĉoj, li tamen, ĝis nun ankoraŭ, ne amuzis sin vere. Tial li intencis, sen eliri el palaco, pasigi tiun tagon kun plej granda pompo. Li do surprenis plej multekostajn vestojn kaj sidiginte sur tronon, li allasis ĉiujn al admirado de tiu brilego. Ĉar li volis, ke ili ekkonu lian komplezon kaj malavarecon, la gastoj alkondukitaj al majesta konstruaĵo, trovis sur tabloj, dismetitajn, multvalorajn donacojn. Sur ĉiu el ili, estis skribita nomo de tiu, kiu povis ĝin alpreni; poste oni iris en la salonojn de l' monarĥo. Sed la Ĉefmarsalo aspektis iom deprimita, ĉar ŝajnis al li, ke la ora pokalo, kiun ricevis la Subtrezoristo, estis iom pli multepeza, ol lia. La Kortegestrinon de la reĝidino ekgravis la rubenaj orelringoj donacitaj al la Ĉasestredzino, dum ŝi ricevis nur la smeraldajn kaj sen tripirformaj pendaĵoj. Al la Ĉefkanceliero estis oferita, neneigeble riĉa monujo kun dia-

mantoj, sed tiu, kiun alprenis la Ĉefsekretario, kvankam ne tiel multekosta, surhavis portreton de l'reĝo. Kiam do ĉiuj venis en la ĉambrojn de Seged, malgraŭ ilia devigado al ĝojo, li rekonis, ke ili estis ofenditaj. Li tial adiaŭtis la malkontentulojn kaj ilin forlasis—kaj tiel finiĝis sesa tago.

Kiam Seged, vekiginte sepan matenon, pripensis, kiamaniere li sukcesus amuzi sin plibone ol ĝis nun, ŝajnis al li, ke hieraŭa tago tial malbone pasis, ke trouzante monarhan majestecon, li malinklinigis kaj fortimigis la gekunulojn. Li decidis do, hodiaŭ komunigi kun ili ĉiuj, kiel se ili estus al li egalaj. Tiu ideo multe lin ekĝojigis kaj li ordonis anonci, ke dum tuta tago, la alpaŝo al lia persono estos al ĉiu permesita. Sed kiam li aperis inter ili, fariĝis granda interpuŝado — kaj vidante, ke oni malmulte lin atentis, li sentis malagrablan impreson. Dum tagmanĝo okupinte lastan sidlokon ĉe tablo, li ekrimarkis, ke la kunmanĝantoj, precize observante lian hodiaŭan disponon, konsumis tiom, ke por li preskaŭ nenio restis.

Post longedaŭra regalado, la societo iris en ĝardenojn, kie ludis diversaj muzikkapeloj kaj staris sur tabloj plej bongustaj vinoj kaj frandaĵoj en ĝranda abundeco. Trovarmigitaĵoj per drinkaĵoj, ĉiuj multege ĝojigis kriis kaj komencis danci. Sed kiam alvenis vespero, tiu senbridiginta bando fariĝis malkvieta kaj kverelema; oni eĉ komencis sin interbati ĝis tia grado, ke Seged mem, kun kontuzita okulo, estis devigata elŝoviĝi kaj forkuri — kaj tiel finiĝis sepa tago.

Sekviatan matenon, ripozinte post hieraŭaj lacigoj, Seged projektis arangi distraĵojn spritajn kaj intelektajn. Oni alvenigis saĝulojn; sed alveninte, ili eksilentigis, kiel se oni kunligus iliajn buŝojn. La monarĥo supozante ke ili mutigis, pro modestego, diris:

Vi forigu timemon kaj oferu al ni ion da trezoroj el via scienco. Tiam la akademia profesoro komencis la paroladon, sed kiam post tri horkvaronoj, li atingis apeŝaŭ la duan paraĝrafon de l'una parto kaj du ankoraŭ restis, oni anoncis, ke tagmanĝo estas preta kaj Seged spiris libere:

La saĝuloj manĝis vigle kaj avide. Malgraŭ sia adoro por la sobreco, ili ankaŭ malplenigis pokalojn kaj kalikojn kaj Seged pripensis, ke la vino faros ilin pli elokventaj. Tio okazis efektive; komenciĝis disputo, ĉiu subtenadis arde sian opinion, post argumentoj venis mokaj aludoj, malbenoj, poste estus okazinta io ankoraŭ pli maldeca, se ne estus ordoninta Seged al saĝuloj, ke ili iru for — kaj tiel finiĝis oka tago.

Kiam vekigis Seged sekvintan tagon, venis al li la téatrestro, deklarante, ke la muzikistoj, aktoroj kaj dancistoj, atendas lian ordonon rilate al scena elpaŝo. Tio gajigis multe Segedon, ĉar li jam nesciis, kian amuzplanon hodiaŭ fari. Li do ordonis, ke tuj post tagmanĝo, oni arangu plej belartajn koncertojn, ke ĉiuj muzikistoj, kiuj sin tie trovis, aperu, por ludi kune, ke la komedio estu nova kaj tre ridiga, la baletoj kaj scenorĥamajoj, nekutime efektaj kaj bongustaj.

Kiam, post tagmanĝo, oni malfermis pordon de l'apuda salono, aŭdigis tondrebrua ludo de kelkcentmuzikantoj. La aŭskultantoj komencis mallaŭte plendi pro troa tonakreco. Seged aŭdinte tion, ordonis interrompi koncerton kaj oni pasis al komedia scenejo. Sed tie komenciĝis ia intriga komplikado: ĉar la Subtrezoristo reĝa favoradis la aŭtoron, la Ĉevalejestro, lia malamiko, instigis siajn partianojn, ke dum la aplaŭdado, ili komencu laŭtan piedfrapadon. Ĉar la Subtrezoristo estis grandaĝa kaj la Ĉevalejestro juna, la sinjorinoj ekfavoris la duan per aplaŭdoj kaj la reĝo rajtigis ilian voĉsuperecon. Pro tiu malagordo, la komedio restis do nefinita.

En la baleta spektaklo, la fulmotondroj ekterurigis la plijunan regidinon; tial la reĝo ordonis ŝanĝi scenejan ventegon en belveteron. Sed kiam Pluto kun Prozerpino kaj furioj komencis salti sur Elizeaj kampoj kaj tio ridigis la rigardantojn, Seged koleriginte, revenis en sian ĉambron— kaj tiel finiĝis nia tago.

Restis do nur unu tago, por ĝui plezurojn. Ĉar la favoratino de Seged, delonge adorata, Amida, trovis sin en la societo, li projektis al ŝi oferi tiun tagon. Tial oni preparis luksan festenon, koncerton, iluminacion, fajraĵojn kaj balon en ĝardeno palaco. Kiam levigis Amida, ŝi trovis sur sia tualeta tablo, senfinan nombron da juvelaĵoj, inter kiuj distingis sian kolonamo kun portreto de Seged, ĉirkaŭita per grandegaj diamantoj.

Kiam li eniris, li trovis ŝin en brilo de liaj donacoj. En lia ĉesto, ŝi kisis la portreton kaj diris, ke ĉio cetera ŝajnas al ŝi nur malvaloraĵo. Kortuŝita per tia deklaro, li sidigis ŝin sur ĉefan lokon, ĉe tablo.

La ciferoj de Amida ĉie estis videblaj; dum koncerto, oni kantis kaj ludis ŝiajn laŭdojn; en fajraĵoj brilis ŝia nomo; eĉ per danco kun ŝi, la reĝo komencis balon.

Kiam alvenis nokto, Seged rimarkis, ke Amida elirinte el palaco, direktigis al unu el plej belaj ĝardenaj kioskoj; li do iris, per sekretaj vojetoj, en saman flankon.



Post senpacienca kuro, li haltigis fine, rekoninte la voĉon de Amida, kiu parolis al iu, per tiuj vortoj:

— „Ho, plej kara Zelmir! (li estis pordgardisto) — kial do la sorto ne destinis Segedon, por gardi la pordon, kaj ne faris vin, Zelmir, monarĥo“!

Li rigidigis tion atdinte kaj forlasinte ĝardenon, li eliris sur kampon malespera kaj dolorplena.

Vagante nokte, li renkontis Safaron, sian antaŭan instruiston, kiu profitante de l'malvarmeta, freŝa aero, promenadis ĉe bordo de l'torento.

Seged konfidis al li sian disrevigon kaj plendmotivon, rakontante, kiamaniere, dezirinte distriĝi, li nur trovis enuon kaj naŭzon. Sofar diris:

— „Multfavora reĝo! Oni ne povas ordoni al plezuroj, ke ili venu—kaj kiam ili bonvole alvenos, oni devas scii, kiel ilin ĝui“!

esperantigis *Helena Hempel*.

## Esperantaj Proverboj

DE PETRO STOJAN L. K.

Avarulo grimacas, dum bonulo donacas.

Bonon konfesu, malbonon forgesu.

Brava soldato ne timas pri bato.

Celo atingita — vivo finita.

Ĉu soldato — ĉu la caro, ambaŭ kuŝos en tombaro.

Dio amas justulon, mono ŝatas kalkulon.

En la maro rulas ondo, famo iras tra la mondo.

Fervora abelo — bongusta mielo.

Guto en la maro — homo en homaro.

Homo projektas, Dio direktas..

Honesta laboro pli valoras ol oro.

Hundo antaŭbojas bravulon kaj postmordas timulon.

Ivano ploras, — Johano laboras,

Ivano laboras, — Johano sinjoras.

Kiu ne tro ripozas, tiu neniam almozas.

Kia bedo — tia bukedo.

Kia estraro — tia anaro.

Kia homo — tia domo.

Kia matrono — tia buljono.

Leporon timas rano, leporon timigas kano.

Mortanto lasas tutan oron, sed kunportas

kortrezoron.

Monhava estas ĉiam prava.  
 Ne en la barbo estas saĝo, ne en lipharoj la kurajo.  
 Ora ŝlosilo estas pliforta ol fera barilo.  
 Por ĉiu fingro estas la ringo.  
 Riĉulo vivas laŭ bontrovo, mizerulo—laŭ la povo.  
 Riĉa bankisto maldormas pro ŝtelisto.  
 Se povus agularo, se scius junularo.  
 Se vi igis asketo, ne revu pri viandeto.  
 Sen kamparano ne vivus la urbano.  
 Sen pluganto ne estus eleganto.  
 Silente flugas plena abelo—brue rulas malplena barelo.  
 Superflua mono—en la poŝo ŝtono.  
 Tro da ora mono—tro da falsa tono.  
 Tranĉilo kiel donaco estas kaŝita minaco.  
 Trolonga atendo—senvorta plendo.  
 Urbo superstiĉa—urbo malriĉa.  
 Urso kaj abelo, ambaŭ revas pri mielo.  
 Uragano blovas—radikojn elprovas.  
 Utila estas mono por vera bezono.  
 Vulpo pretigas kiam noktigas.  
 Vulpo ovon ne atentas, kiam ĝin kokido tentas.  
 Zorga laboro — certa valoro.

## „ANKORAŬ UNU KAŬZO KIAL ESPERANTO TIEL MALFACILE DISVOLVIĜAS“.

Min tre interesis la vortoj de S-o Mieczyslaw Kaus en la Aprila numero de via ŝatata gazeto, pri la ĉi-supra temo. Mi konsentas kun li kaj liaj vortoj igis min pensi pri alia kaŭzo kiun, kun via permeso, mi klarigos per malmultaj vortoj.

Ŝajnas al mi, ke la esperantistaro preskaŭ forgesas ke estas plej grave propagandi nian aferon inter la gejunularo de la mondo ĉar kiam la gejunuloj de hodiaŭ estos fariĝintaj la geviroj de morgaŭ, ili jam estos kutimiĝintaj pensi en pacaj terminoj kaj Esperanto por ili estos la natura ilo por internacia inter-rilato. Esperanto mem ne efikas se la uzantoj ne estas homamantoj, kies unua celo estas „monda frataro“ kaj ĉiamdaŭra paco.

Estas malfacile disfaligi la barojn, kiuj prokrastas nian eniron en la lernejojn tial ni devas eltrovi alian rimedon por kapti la armeon de la gejunularo. Jen kie la esperantistaro malsukcesis. La Skolta Movado, kiu estas dis-

vastigata en ĉiun civilizitan landon de la mondo, estas pli granda ol la esperantista, tamen la esperantistaro preskaŭ ĉie ignoras tiun plej grandan paco-celantan Movadon. La knaboskoltoj kaj skoltinoj estas edukataj malami la militadon kaj esti homamaj kaj tial, mi sugestas, ili estas ĉiam pretaj ensorbi la instruojn de esperantismo.

La SKOLTA ESPERANTISTA LIGO fondiĝis antaŭ kelkaj jaroj por kunligi ĉiujn esperantistajn geskoltojn, por propagandi Esperanton inter la geskoltaro de la mondo, k. t. p. kaj ni forte alvokas al grupoj kaj asocioj ĉie klopodi pri la geskoltaro en siaj koncernaj distriktoj. Jen plej kulturinda kampo. Pluajn detalojn kaj aligilojn sendos, kaj mondonacojn dankeme ricevos la Generala Sekretario, S-ro Norman Booth, F. B. E. A., Netherton, Huddersfield, Yorkshire, Anglujo.

Lastatempe la skribanto sukcesis fariĝi Eksterlanda Redaktoro de Brita, monata gazeto pri skoltismo, tendarismo, eksterdogmismo, eksterdomismo, karavanado, k.t.p., „The Open Road“ („La Libera Vojo“) kaj li organizis servon de korespondantoj inter membroj de S. E. L. en multaj landoj. Li redaktas ĉiumonate, mallongan esperanto-angulon en Esperanto, al kiu oni disponos pli da loko kiam multaj esperantistoj abonos. La jara abono por Poloj estas, laŭ speciala arango, 3 anglaj ŝilingoj afrankite (t. e. anstataŭ 3 ŝ.) kaj la adreso de la gazeta oficejo estas: Denison House, 296 Vauxhall Bridge Road, London, S. W. I. La Eksterlanda Redaktoro bonvenos esperante-skribitajn raportojn pri Polaj aktivecoj je skoltismo, turismo, eksterdomismo, tendarado, k. t. p.

Jen mi montras la vojon. Kiu sekvos ĝin. Faru vian eblon por S. E. L. kaj „La Libera Vojo“.

J. W. LESLIE,

Propaganda Fakestro de S. E. L.

Eksterlanda Redaktoro de „The Open Road“.

## Pri la „Vivo de Zamenhof“\*).

Ni posedas en Esperantujo mult multe da tiel famekonataj, eminentaj, aŭreolitaj nomoj, kiel tiu de Edmond Privat. Altmerita propagandisto, ĉarmiga oratoro, talenta verkisto, kiu belsone, noble kaj vire scias prezenti sian pen-

\*) Edmond Privat. „Vivo de Zamenhof“. Eldonejo Hirt en Leipzig, 1923, p. 109.

son — jen kia li aperas ĉiam al niaj rememoroj kaj admiro. Ĉe ni, Poloj, li estas respektata speciale ankaŭ pro la historia libro, kiun li skribis pri nia patrujo. Lia lasta verko pri la vivo de nia Majstro brilas per ĉiuj ecoj de lia potenca stilo. Ĝi estas bildo forta, viva, alfluge poezia kaj samtempe vera, sincera kaj preciza, kiu gvidas nin de la lulilo Białystok'a — tra revoj idealaj kaj pena batalado, tra gloroj kongresaj kaj ploroj primilitaj — ĝis al lasta spiro de Ludwik Zamenhof, al silenta tombo varso-sovia. La tasko estis vere granda kaj serioza: prezenti la statuon de tiu genia homo al la ama sciolo de estontaj generacioj; sed ankaŭ la skulptisto neordinara. Lia „zorgo ne estis tia“, „ĉu la verko „plaĉos al unu aŭ alia“, sed: „ĉu sufiĉe fidele kaj ame ĝi sekvas la gustan veron“; li ja „kiel lumon konservas en la koro“, kion li „ŝuldas al memoro de l'mortinto, ĉiam viva per inspiro“. Kaj radioj de tiu lumo benante faladis sur la plumon, kiu kuris tra papero.

Ne pri niaj plaĉoj do volas ni ĉi-tie atentigi la estimatan aŭtoron. Ni tre ĝojas, ke li preterlasis nenion pri la homafanaj ideoj de nia Majstro. Vereco de la portreto, ĝia pleno postulis tion. Ankaŭ pri la gusteco de tiuj ideoj ne estas nia intenco diskuti: tro proksima por tio estas la granda sufero de tiu „tago malvarma, malluma, pluvanta“ kiu forrabis al ni ilian karan kreinton.

Pro la graveco de la verko tamen, same kiel pro ĝia granda valoro, ni opinias, ke ĝi devus resti plene objektiva, tute pura de ĉiu tendenco. Tio ne signifas, ke en grandaj linioj la aŭtoro trudu ion el siaj personaj konvinkoj. Ni rimarkis tamen kelkajn detalojn, kiuj aperas kvazaŭ makuletoj sur la bela, riĉa ŝtofo, el kiu estas tekstita la libro.

Ni difinu bone, pri kio ni parolas: se oni priskribas vivon de granda homo, se oni faras tion por liaj disĉiploj kaj admirantoj — kaj faras ĝin majstre — la libro fariĝas kvazaŭ sanktaĵo. De tie la devo por aŭtoro — forgesi pri si mem, pri siaj intimaj preferoj, paroli *nur* pri la priskribata persono. Tion, bedaŭrinde, Privat ne ĉiam observis. Ni donu kelkajn ekzemplojn.

Parolante pri la rilato de esperantismo, al homaranismo S-o Privat diras:

„Jen tiu homo \*), tro alta super sia tempo, devis kvazaŭ honte peti senkulpigon de malgranduloj pro grandeco sia. Li devis apartigi du progresojn por ne difekti unu

\*) Zamenhof.

per alia. *Sed la divido estis nenatura. La estonteco referos en la vivo l'unuecon de la penso Zamenhofs...* La lingvo kaj la celo de l'profeta homo venkos unu per l'alia. **Ĉar tie kuŝas la vojo kaj la sorto de l'homaro** \*).

La historiisto ŝajnas tie mem fariĝi profeto. Ĉar kiu ja kuraĝas diveni kie kuŝas la sorto de l'homaro? Tion jam diris la antikva Horatius: „Tu ne quaesieris“ \*\*)...

Ankaŭ pri la homaranismo:

„Iam *venos* tempo, post longa naŭzo pri militoj, kiam tiuj ĉi principoj estos avide serĉataj kaj studataj, kiel eblaj saviloj el terura stato“ \*\*\*).

Ni ripetas, ni ne volas kritiki la ideojn de la Majstro. Se iam Privat en propra nomo, kaj sub sia persona aŭtoritato, prezentos al ni siajn opiniojn pri la estonto de l'homaro, ni diskutos kun li volonte.

Nun ni limigu al rimarko, ke la Majstro tre bone komprenis la neceson de la disiĝo de siaj sociecaj opinioj de la esperantismo, kion lia fervora historiisto ŝajnas ne kompreni.

Ni ofte legas en la libro pri tio, kion Privat nomas „bojado ŝovinista“, kaj nur unufoje ni ekvidas la laŭdon de ama patriotismo, sed ĝi estas la vortoj de la Majstro mem...

Por kio ankaŭ tiu stranga kaj tute senbezona frazo sur p. 72: „Ankaŭ scienco ne konas papojn“? Kio konas aŭ ne konas papojn? Kial miksi la veneratan de multaj milionoj da kristanoj titolon de Roma Ĉefpastro kun absolute fremdaj, malproksimaj aferoj? Ĉu ĝi ne povos esti malbonintence traktita kiel ia delikata postsigno de ŝvisa ŝovinismo religia?

Nun, la simpatia aŭtoro permesu kelkajn rimarkojn pri faktoj *historiaj*. Skribante pri „pogromoj“ kontraŭhebreaĵ en Rusujo, dum la revolucio de 1905—6, li diras:

„En Varsovio polaj socialistoj tion malpermesis per armita junularo gardanta ĉiujn stratojn“ \*\*\*\*).

Ni tre scivolas, kiu povis tiel erare informi Privat. Ĉu estas eble imagi armitan socialistan junularon en la stratoj, dum la tempoj de cara tiraneco? La fakto estis,

\*) P. 88, 89.

\*\*\*) „Ne demandu, eterna leĝo ne permesas scii, kian finon dioj donis al mi, kaj al vi, Leukonoe“!

\*\*\*\*) P. 99.

\*\*\*\*\*) P. 54.



ke pro necerteco de vivo dum la revolucio, loĝantoj de domoj laŭvice gardis iliajn hejmojn kontraŭ *banditaj* atakoj, kiuj same minacis Polojn, kiel Hebreojn. Pri „pogromoj“ en Warszawa neniom estis timo.

Pri komenco de la granda milito de 1914:

„En Varsovio la vivado farigis abomena... Ĉerkesoj tramarŝis, kantante laŭritme rabkantojn. La Poloj tremis, sed pli tremis la Hebreoj“ \*).

Dio vidas, ke ni neniom inklinas defendi la iaman rusan registaron. Sed estas afero tute nekredinda, ke la armeo de granda eŭropa ŝtato, eĉ la cara, permesu al si kanti rabkantojn en la urbo, kiu apartenis al la ŝtato! Kaj Poloj ja ne tiel facile tremas, ekvidinte tramarŝantajn militistojn... Ni ne volas paroli pri Hebreoj, kiuj eble defendos sin mem.

Sed sufiĉe pri ĉio-ĉi. Ĝi estas nur detaloj, apenaŭ rimarkeblaj dum la legado de la ĉarma libro. Ni esperas forte, ke ili malaperos en la dua eldono. Senhezite ni povos tiam laŭdi kaj rekomendi al ĉiuj la verkon de tiu, kiu havos mem monumenton en Esperanta Historio, kiu jam havas ĝin en niaj koroj.

\* \* \*

Ankoraŭ parolu da vortoj pri la *eldono*. Ni preferus pli dikan paperon, pli grandan formaton, ankaŭ pli grandajn literojn, en unukolora kovrilo. La nuna aspekto, certe, estas bela, ni dirus *koketa*, tre taŭga por novelaro, sed ne tute konvena por tiel serioza verko.

*Jan Kosteki.*

## KOMUNIKOJ.

La 9-an de k. m. okazis en la loĝejo de nia konata Varsovia Samideano, S-ro Włodzimierz Miernicki, en la bonekonataj luksaj salonoj de artfotografejo „Studio“, privata koncerto, al kiu estis invititaj multaj varsoviaj esperantistoj.

---

\* ) P. 95—6.

Oni aplaŭdis kaj ripetigis precipe la popularan kanton de „Krizantemoj“ en bela esperanta traduko de Eska, kiun kantis agrable la simpata dommastro.

Inter la ĉeestantoj ni rimarkis S-ron Jerzy Loth, Prezidanto de Pola Esp. Societo, S-ron Redaktorojn Leon Belmont kaj Stanisław Karolczyk kaj la neoftan kaj ĉiam bonvenatan gaston de Praha, S-ron Władysław Mergel, kiu ĵus revenis de malproksima vojaĝo al nuntempa Moskvo.

Post la koncerto la juna parto de gegastaro dancis fervore ĝis meznokto.

## K O R E K T O.

En nia lasta numero aperis listo de novelektita Estraro de Pola Esperantista Societo, en kiu mankis la nomoj de: *S-o D-ro Szymon Karlsbad, Bibliotekisto, kaj S-ino Eugénie Cense, Dua Sekretario.*

Ni rapidas ripari tiun-ĉi bedaŭrindan forgeson malgraŭvolan.

LUBLIN. Fervore propagandas Sinjoro Czesław Pruski kiu presigas artikolojn pri Esperanto en loka ĉiutaga ĵurnalo „Ziemia Lubelska“. Kurso gvidata de S-o Pruski havas grandan sukceson.

RADOM. La loka esperantista rondeto gvidata de Sinjoro Edward Franciszek Dybus bone disvolvigas kaj baldaŭ, ni esperas, fariĝos filio de P. E. S. En sama urba interpostoficistoj propagandas S-o Kijak.

WARSAWA. 28 de Junio okazos eksterordinara kunveno de P. E. S. detalojn vidu en anoncoj. Ĝi estos jam la lasta kunveno antaŭ la somerferioj.

DE LA REDAKCIO. Pro sendependaj de ni kaŭzoj la nuna numero de Pol. Esp. aperas malfruigita sed en duobla amplekso. Sekvanta numero aperos post la ferioj en Septembro.

## CO TLUMACZYĆ?

Esperantysty i ogół polski, zwłaszcza z pośród tych, co trafną radą mogliby nam pomóc w naszych usiłowaniach właściwego informowania cudzoziemców o Polsce, zechcą łaskawie wskazywać nam utwory, rozprawy i artykuły, nadające się ich zdaniem najbardziej do rozpowszechnienia zagranicą.

W tym celu otwieramy stałą rubrykę pod wymienionym tytułem.

## PRZEKŁADY UTWORÓW POLSKICH NA ESPERANTO, ORAZ NA INNE JĘZYKI OBCE, GOTOWE DO DRUKU I W OPRACOWANIU.

Wziąwszy sobie za zadanie zaznajamianie cudzoziemców-esperantystów z Polską i utworami jej ducha, zbiegamy się w tym działającymi pokrewnie za pośrednictwem języków narodowych.

Sądzimy przeto, że przysłużymy się wspólnej sprawie, jeżeli celem zapobieżenia jednoczesnemu tłumaczeniu tych samych prac przez kilka osób na jeden i ten sam język, wprowadzimy stały dział pod wskazanym nagłówkiem, oczekując odpowiedniego materiału do opublikowania.

W razie zgłoszenia przekładu już zapowiedzianego przez kogo innego, Redakcja zawiadomi o tem interesowanych listownie, nie czekając ukazania się następnego numeru pisma.

### ZE ŚWIATA NAUKOWEGO I PRASY.

Zdania uczonych, polityków oraz publicystów naszych i obcych o istocie języka pomocniczego, tudzież ruchu esperanckim stanowią ważny przyczynek dla naszej działalności. Czytelnicy ułatwią nasze zadanie przez systematyczne komunikowanie Redakcji ukazujących się rozpraw i nadsyłanie napotykaných artykułów, wzmianek etc, z zaznaczeniem nazwy wydawnictwa i daty wyjścia z druku. Dostarczenie posiadanych już w tym względzie dawniejszych danych pożądane.

#### Gazetoj ricevitaj.

„*Corriere Balcanico-Esperantista*“ (18) uzas „anke“ anst. „ankãŭ“ k. t. p. Jen nova speco de la ridindaj „io-istoj“. Kvazaŭ nia lingvo ne estus sen tio suliĉe simpla!

Skandinava Esperantisto (3), France-Esperanto (40), The British Esperantist (216), Esperanto Praktiko (52), La Vero (12), Arguso (6), Holanda Esperantisto (65—66), Marto (4).

*La Verda Ombro* (1—2), kiu povas servi kiel modelo de *malbona* stilo, kun literatura aldono: „Unu paĝeto en mia lernejavivo“ de rusa blindulo Vasili Eroŝenko; la aŭtoro diras:

„...la nokto instruis al mi antaŭ ĉio dubi ĉion (sic) kaj ĉiujn, ĝi instruis min kredi nek unu vorton de niaj instruistoj, nek unu frazon de kiu (sic) ajn aŭtoritato...“

Malgaja instruo! Felice Eroŝenko trankviligas nin, ke aliaj blinduloj ne lernis la samon. Sed por kio presi tiel instruciĉajn memorlibrojn?

Ukraina Stelo (25), Nova Eŭropo (12—13), Bulgara Esperantisto (8), France—Esperanto (40), Germana Esperantisto (328), Esperanto—Praktiko (53), La Revuo Orienta (4), Holanda Esperantisto (71, 72, 73), La Semisto (32), Belga Esperantisto (95—96), British Esperantist (217), Esperanto Triumfonta (140), Sennacieca Revuo (37—38), Itala Esperanta Revuo (4—5), Argusq (7), La Verda Ombro (3—4), La Marto (5).

„*La Espero*“, Himno Esperantista, Poezio de Dro L. L. Zamenhof, Muziko de F. de Ménil. „*La fama humora kanto Esperanto*“ de Harrison Hill, „*La Vera Frataro*“ vortoj kaj muziko de Harrison Hill, — kaj *Himno de danko* de la sama. Ĉio eldonoj de British Esperanto Association, 17, Hart street, London, W. C. 1.

*Esperanto als internationale Hilfssprache*. Bericht des Generalsekretariats des Völkerbundes angenommen von der 3. Vollversammlung des Völkerbundes. Deutsche Übersetzung F. Hirt und Sohn, Leipzig 1923. P. 48.

P. S. S-ro Paul Benoit en Nr. 130 de „Le Monde Espérantiste“ tute neĝuste kulpigas nin pri argumentado *kontraŭ* la interna ideo. Ni konsilas al li relegi atente la artikolon „Grava Dangers“ en Nr. 91 de „Pola Esperantisto“.

*Salom—Alehem. Peroc. Hebreaj Rakontoj*. Traduko de I. Muĉnik. F. Hirt und Sohn, Leipzig, 1923. P. 78.

*Adolfo Oberrotman kaj Teo Jung. La lastaj tagoj de Dro L. L. Zamenhof kaj la Funebra Ceremonio*. Varsovio kaj Kolonjo, 1921. P. 47 kun 11 fotografaĵoj.

Ni ŝuldas varman dankon al la eldonintoj por tiu belaspekta kaj interesoriĉa memoraĵo pri la suferiga momento de la morto de nia Majstro.

Ĝi havas certe grandan valoron historian.

*Margaret Gatty. Alegorioj el la naturo*. El angla l. trad. George Gordon. Dua kaj pligrandigita eldono, Londono, B. E. A., 1922. P. 66.

Vere ĉarmaj noveletoj. Bedaŭrinde la stilo de la traduko ne estas kontentiga. Ĝi estas eble tro laŭvorta?

*Hontul!* „Le Monde Espérantiste“ (130) en artikolo „Ankoraŭ pri organizo“, subskribita de ia S-ro M. E. skribas, ke la intenco de U. E. A. kaj Centra Oficejo estis nur tia: „*kapti nian monon*“. „Antaŭe malamikoj, U. E. A.

kaj C. O. fine amikiĝis, preferante interdividi ol konkurencojn“.

— Kaj la „Verda Utopio“ (1—3) en la „Interna Ideo sola estas vera Esperantismo“ ne hezitas diri pri la Majstro: „Ĉe la dua kongreso, riproĉis li *alkraĉante en la vizagon* al tiaj malnobluloj, kiuj mem volas taksi Esperanton laŭ la praktika utileco“.

En kia kompanio ni do subite troviĝis? Vere, la franca gazeto povas doni manon al la japana. Sed aliaj esperantistoj sin gardu doni manon al la ambaŭ!

— En la sama „Verda Utopio“ oni jam dolonge publikigas longegajn „Impresojn pri Japanujo“ de I. Serišev, kiu estas unu sola maljustega kalumnia ofendo al la japana socio kaj kulturo. Kiel la japanaj samideanoj povas tion pacience toleri?

*Ni ankaŭ iom ridu!* La „Vegetarano“ (3) skribas, ke la doncado „malaltigas la homon al *ludpilko de satano*“ — kaj en la sama gazeto nia samlandano Stefan Bandzarewicz el Mikołajówka ĉe Biała Podlaska anoncas, ke li deziras korespondi „pri tiuj nutraĵoj, kiuj ĉefe enhavas *ritmon*“. Li konsideru! tio ja povus esti nutraĵoj *dancantaj*...

*La nombroj en parentezo signifas la numeron.*




---



---

**Redaktoro kaj eldonanto: STANISŁAW KAROLCZYK**

---



---

Redakcio kaj administracio: Warszawa, str. Królewska 19.

Funkcias nur lunde kaj ĵaŭde de 8—10 h. vespere.

---

Presejo: Wacław Maślankiewicz. Warszawa, Nowogrodzka 17.



# OGŁOSZENIE.

Zarząd Polskiego Towarzystwa Esperantystów ma zaszczyt zawiadomić niniejszym Członków Towarzystwa, że dnia 28 czerwca, w czwartek o godz. 8 wieczorem odbędzie się w lokalu Towarzystwa, Królewska 19,

## NADZWYCZAJNE ZEBRANIE OGÓLNE

którego porządek dzienny jest następujący:

1. Sprawozdanie z IV Konferencji Towarzystwa.
2. Przyjęcie uchwał IV Konferencji.
3. Sprawozdanie kasowe.
4. Podwyższenie składki członkowskiej.

W razie nieprzybycia dostatecznej liczby Członków, zebranie odbędzie się **w drugim terminie** o godzinie 9 wieczorem tegoż dnia i w tymże lokalu, bez względu na liczbę obecnych.

ZARZĄD

Polskiego Towarzystwa Esperantystów.

# **Polskie Towarzystwo Esperantystów**

## **Warszawa, ulica Królewska 19**

### **WEZWANIE DO ZAPŁATY!**

Członkowie, zalegający w opłacie składek, zechcą uiścić je jaknajśpieszniej, wnosząc należność na konto czekowe 'T-wa' Nr. 3874 w Pocztovej Kasie Oszczędności. Za półrocze bieżące przypada Mkp. 6.000,—za cały rok 1922-gi Mkp. 12.000.

Ociągających się będzie obowiązywała podwyższona opłata wstecz. Wysokość nowej stawki określi Ogólne Zebranie w czwartek dnia 28-go czerwca 1923 r.

Składkę członkowską należy uzupełnić dodatkową Mkp. 200,— stanowiącą przybliżony ekwiwalent kosztów, ponoszonych przez T-wo za rozsyłane blankiety P. K. O. i liczoną przez nią T-wu prowizję.

Członkowie, otrzymujący „Pola Esperantysto“, zechcą ponadto dołączyć Mkp. 18,000—za 12 numerów pisma i na ogólną sumę wypełnić blankiet P. K. O., który wraz z gotówką przyjmie każdy urząd pocztowy.

### **ZEBRANIA.**

W 1-szy nieświęteczny poniedziałek każdego miesiąca odbywają się w lokalu T-wa zebrania ogólne, rozpoczynające się punktualnie o godz. 8-ej wieczorem, bez względu na liczbę obecnych. Najbliższe 25.VI.1923.

Co drugi czwartek odbywają się tamże zebrania towarzyskie. Najbliższe daty: 28.VI.1923.

### **KURSY.**

W T-wie prowadzi się stałe kursy Esperanta, w dobranych kompletach, w miarę napływania zgłoszeń.

### **KANCELARJA, BIBLIOTEKA I CZYTEL尼亚.**

Są czynne od godz. 8-ej do 9-ej wieczorem w poniedziałki i czwartki, z wyjątkiem dni świątecznych.

Zarząd zwraca się do Członków z gorącą prośbą o poparcie jego usiłowań w kierunku rozwinięcia działalności T-wa, przede wszystkim przez udział w obradach i regularne uiszczanie składek.

**ZARZĄD.**

**Redaktor i korespondent: STANISŁAW KAROLCZYK.**

**Presejo: Wacław Maślankiewicz, Warszawa Nowogrodzka 17.**